

Saluton!

Bulteno de la Esperanto-Societo de Ŝikago, № 4 (19), Aprilo 2006

Adreso (provizora):
Esperanto Societo de Ŝikago
p/a Viktor' Pajuk
8228 O'Connor Dr., # 2F
River Grove, IL 60171
(773) 344-2276
www.esperanto-chicago.org/

Estraro:

Prezidanto – Viktoro Pajuk
Vicprezidanto – Puramo Chong
Eksprezidanto – Roberto Stalzer
Sekretario – Gertrude Novak
Kasisto – Karlo Gunn

Membrokotizoj:

Membro-subtenanto \$40/jare;
Familio \$30; Regula \$20;
Studento aŭ pensiulo \$10.

Gifts are welcome also.

Dues are needed for the routine expenses of our Society.

Check should be payable to:

The Esperanto Society of Chicago, and mailed to our **Treasurer, Charles Gunn, 828 S. Ada, Chicago IL 60607**

Kunvenoj:

Membroj de la Ŝikaga Esperanto Societo kunsidas la kvaran **mardon** de ĉiu monato en **Sulzer Public Library, 4455 N. Lincoln Ave., Chicago, IL 60625-2101.**

Kunvenoj komenciĝas je **7 p.m.** en la Suda Konferenca Salono, unua etaĝo.

Bonvenon!

Antaŭ delonge mi jam sciis, pri kio informi vin en ĉi numero de nia bulteno, sed mi ne rimarkis, kiam venis la aprilo kaj mia filino matene sukcese primokis min – ja estis la Tago de vera (kaj verda) stultulo. Sed la temoj de nia hodiaŭa numero estas iomete nigraj. Do, laŭ la vico.

Laste okazis

Nia lasta klub-kunveno estis dediĉita al la XX-a datreveno de la katastrofo en la ukraina urbeto Ĉornobilo. Kion signifas ĝia nomo? Legu du jenajn fragmentojn kaj vi ekkomprenos mem: **10** Kaj la tria anĝelo trumpetis, kaj falis el la ĉielo granda stelo, brulanta kiel torĉo, kaj ĝi falis sur trionon de la riveroj kaj sur la fontojn de la akvoj; **11** kaj la nomo de la stelo estas Absinto; kaj triono de la akvoj fariĝis absintaĵo; kaj multe da homoj mortis de la akvoj, ĉar ili maldolĉiĝis. (La Sankta Biblio, Apokalipso, ĉ. 8).



“...min vokis unu mia konatulino kaj donis ian kreskaĵon, elŝiritan kun radiko. Nenio rimarkinda – krudaj melhelverdaj folioj kaj dika trunko, kvazaŭ farbita per viola inko. Tiu kreskaĵo nomiĝis ĉornobil “absinto”. Amara estis ĝia gusto” – tiel ukraina doktoro kaj verkisto Jurij Ŝĉerbak en sia libro *Ĉornobilo* (1987) kunligis situacion post la katastrofo kun la antaŭdiro de Sankta Johano.

Ankaŭ aprile mortis nia Majstro, li estis entombigita en la urbo ege “verda”:

Varsovio – la pola ĝemelo de Ŝikago

Samideanoj, akceptu vi
Korajn salutojn el Varsovi!
Akceptu ilin, tra l' tuta mond'
Disportu ĉien al nia rond'.
Diru, ke ankaŭ sur pola ter'
Batas la koroj por sankt-esper',
Ke ankaŭ tie, apud Vistul',
Renkonte brilas amik-okul',
Kaj etendiĝas fidele man',
Sonas: "Bonvenu, samidean!"
Kvankam la nokto ĉirkaŭas nin,
Ni kredas: Tago brilos en fin'.
Leviĝos fine la ora sun',
Kie nur steloj flagretas nun.
Ektondros laŭte triumfa kant'
Pri fina venko de l' esperant';

UTILAJ RET-ADRESOJ:

UEA – Universala Esperanto Asocio
<http://www.uea.org>

Esperanto.Net – Home of a comprehensive FAQ list
http://www.esperanto.net/info/index_en.html

ELNA - A source of information and educational materials, including a ten-part free postal course; toll free: 1-800-ESPERANTO (1-800-377-3726)
<http://www.esperanto-usa.org/>

Free Esperanto Course on Internet
<http://www.pacujo.nu/esperanto/course>

Esperanto Viva - A free online course
<http://www.mintex.demon.co.uk/esp/viva/angla/index.htm>

Internacia televido en E-o
<http://internacia.tv>

Reta senpaga enciklopedio
<http://eo.wikipedia.org>

Esperantic Studies Foundation
<http://esperantic.org>

Pasporta Servo
<http://home.wxs.nl/~lide/paspserv.htm>

Pola Radio en Esperanto:
<http://www.wrn.org/audio/pol1.ram>

Sekvantaj kunsidoj:

25an de Aprilo – vizito de fama rusa E-poeto k kantisto Mikaelo Bruna Ŝtono (kun koncerto)

23an de Majo – pri siaj travivaĵoj en brazilaj ĝangaloj rakontos d-ino Gertrude Novak

27an Junio – espereble pri sia vivsperto en malproksima Irano rakontos nia nova membro

25an de Julio – dume aliaj niaj gesamideanoj kunvenas en UK en Florenco, ni...

Atenton – ni kunsidos mardon, ne merkredon!

Do mi nur preĝas: Ho, donu Di',
Ke ĝin ekaŭdu ankoraŭ mi!

En la loko kie vivis, laboris kaj agis eltrovanto de Esperanto, kie aperis "La Unua Libro" kaj kie komenciĝis la historio de la lingvo internacia, en la malnova juda tombejo ĉe Okopowa strato (Wola-kvartalo), troviĝas starigita de la tutmonda esperantistaro monumento-tombo de D-ro Esperanto.



Apud la majstro-monumento troviĝas alia tombo, de lia edzino Klara, plej fidela amikino de Ludoviko Lazaro kaj de la ideo. Mirakle ambaŭ tomboj travivis la tragian periodon de la dua mondmilito, post kiu detruita en 87 procentoj Varsovio apektis kiel dezerto el brikoj. Ĉe la strato Zamenhofa 5, sur la muro de starigita en tiu ĉi loko, konstruita post la milito domo, videblas memortabulo pri kreinto de Esperanto, kiu aperis en 100 datreveno de Ludoviko naskiĝo.

Sian apartajn tabulojn kaj straton havas ankaŭ la unua homo, kiu ekparolis en Esperanto al Ludoviko, granda amiko de la majstro, fama pioniero kaj "patro de la E-poezio" (vd. poemon supre) Antonio Grabowski. La unua troviĝas sur la domo, kie iam li loĝis, ĉe la strato Hoża 42, la dua ĉe Varsovia Universitato, apud salono 141 de la Kemia Fako.


Varsovia Vento ekblovis iam, en 1887, kun apero de la Unua Libro. Nia klubo eksentis la blovon en 1991 por serĉi rimedojn popularigi Esperanton precipe en la junulara medio. Tial plej multe el inter la ventanoj estas junaj. Dank' al la kluba laboro reaperis parolantaj en la lingvo internacia gejunuloj komence en Varsovio, sekve sur ekzemplo de la flama agado ankaŭ en aliaj urboj de Pollando. *Varsovia Vento* en 2004 helpis reaperon de PEJ, ĉe ni naskiĝis kaj estis realigita ideo de la Internacia Junulara Kongreso en Pollando, kiu okazis pasintjare en Zakopane. Tamen helpo ĉe la reapero de PEJ kaj realigo de la 61a IJK ne estis "fina venko" de la kluba agado. *Varsovia Vento* blovas pli kaj pli kaj ĝisnunaj atingoj traktas kiel spertodonaj "komoj" en ne ĝis fino eldirita frazo. Ilia retejo: www.republika.pl/viavento/

Esperanto en la mondo

Ankoraŭ unu fama varsoviano – R. Dobrzynski, pri kiu ni multe skribis, ekveturis profesie instrui E-on en la plej prestiĝa ĉina universitato – Pekina. Apude, en maoista parto de Nepalo estis arestitaj du polaj e-istoj, oni lasis ilin post la 'dogan'-pago; en Belorusio estis arestita nia samideano pro la partopreno en kontraŭ-registara manifestacio.

Do, la redakcio deziras al s-ino G. Novak feliĉe reveni de brazila ĝangalo kaj prelegi por ni maje!

GRAVE: kun plezuro ni informas, ke nia ŝikaga E-familio pligrandiĝis je du gesamideanoj de: Irano – f-ino Sapideh, kaj Danujo – d-ro Jakobo. Por konatiĝi kun ili nepre vizitu nian sekvantan **kunvenon-koncerton**, kiu okazos la **25an de Aprilo**. Por vi prelegos kaj kantos nia gasto el Ruslando – **Mikaelo Bruna Ŝtono**. Venigu viajn familianojn, amikojn!

 araneoesp @ yahoo.co.uk